

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1117 (44/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet <http://www.esperanto.it>
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet <http://iej.esperanto.it>
Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.
Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>
feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>
Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Tago de Homaj Rajtoj.....	2
- Romo kaj Parizo en Novjorko.....	2
- Daniela e Aldo su Rai3.....	3
- Aggiornata la pagina FEI su Wikipedia	3
- Correzione	3
- Giorno dell'esperanto a Pescara	4
- Due linguaggi universali: musica ed esperanto	4
- Libri stenna.....	5
- Via Zamenhof.....	5
- Eventoj.....	5
- Edukado.net.....	6
- Esperantista sanktulo	6
- Kongresa temo	6
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton.....	7

MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA TAGO DE HOMAJ RAJTOJ, 10 DECEMBRO 2021

Universala Esperanto-Asocio salutas Unuiĝintajn Naciojn okaze de la Tago de Homaj Rajtoj 2021. Homrajta Tago festas la akcepton de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj fare de Unuiĝintaj Nacioj la 10-an de decembro 1948.

Kiam Hector Hodler fondis Universalan Esperanto-Asocion en 1908, homaj rajtoj formis parton de la internaciista tagordo de la Asocio ekde la komenco: Hodler forte kredis je toleremo, egaleco (inkluzive de genra egaleco) kaj pacaj rilatoj inter nacioj. Li konsideris Esperanton ilo por realigi tiujn idealojn.

Respekto de homaj rajtoj estis formale inkluzivita en la bazajn principojn de Universala Esperanto-Asocio kiam, en sia unua kongreso post la Dua Mondmilito, en Berno en julio-aŭgusto 1947, ĝi aprobis rezolucion kiu deklaris, ke respekto de homaj rajtoj estas esenca kondiĉo por la laboro de la Asocio. Sekve, unu jaron poste, ĝi entuziasme bonvenigis la novaĵon, ke akceptiĝis la Universala Deklaracio. Respekto de homaj rajtoj daŭras kiel fundamenta kondiĉo de la laboro de UEA. La Asocio favore notas la atenton al homaj rajtoj en la lastatempa plano por la estonteco, *Our Common Agenda* (Nia Komuna Tagordo), de Ĝenerala Sekretario António Guterres, kiu alvokas al “renovigita socia kontrakto ankrita en homaj rajtoj.” Laŭ la sama spirito la Ĝenerala Sekretario deklaras, ke “homoj deziras esti aŭdataj kaj partopreni en decidoj, kiuj koncernas ilin.” Ili povas utiligi la rajton esti aŭdata nur se Unuiĝintaj Nacioj aŭskultos en iliaj lingvoj, kaj nur se UN esploros ĉiujn lingvajn rimedojn, inkluzive de la Internacia Lingvo, en la serĉado de aŭtentika kaj substanca dudirekta komunikado.

Tro multa tutmonda komunikado venas de supre suben. Ni devas, en la spirito de Hector Hodler kaj de la hodiaŭa movado por Esperanto, respekti tiun parton de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu postulas lingvan egalecon. La Esperanto-movado, modelo de internacia civila socio, estas ligita al neniuj registaro, subigita al la politika tagordo de neniuj landoj, kaj kovras la tutan mondon, kun parolantoj en la plejparto de la landoj de la mondo. Nia Asocio daŭrigos sian kunlaboron kun Unuiĝintaj Nacioj kaj kun ĉiuj homoj de bona volo por krei tiun etoson de konfido kaj de respekto por homaj rajtoj, kiun la tuta mondo tiel forte deziras kaj bezonas.

ROMO KAJ PARIZO EN NOVJORKO

Sabaton la 4an de decembro, la ĝemelaj urboj Romo kaj Parizo vizitis Novjorkon. Tiu haltejo estas la unua etapo de nia turneo sur la amerika kontinento. Ĝis 37 homoj partoprenis en tiu tre agrabla kaj amika babilrondo. Okaze de la baldaŭa Zamfesto, ni parolis pri nia rilato al Zamenhof. Estis interese konstati kiom malsamas tiu rilato ĉe ĉiu. Por kelkaj Esperanto estas amuza hobbio, kaj aliaj dediĉis sian tutan vivon al la internacia lingvo kaj idealo de Zamenhof. P-ro Humphrey Tonkin sciigis al ni la historion de la Novjorka Esperanto-klubo. Ni ĉiuj esperas, ke ni baldaŭ povos denove paroli kune. Ni deziras al vi bonegan Zamfeston !
Amike, Mark Ĵiro

DANIELA E ALDO SU RAI3

La nota trasmissione di RaiTre *Geo e Geo* ha ospitato Aldo e Daniela Grassini raccontando del loro museo tattile. Vi invito a guardare la parte che li riguarda sul canale Fei di YouTube (<https://youtu.be/mReYgW4cFgE>).

Il sito del museo è anche in Esperanto (<https://www.museoomero.it/>).

Ancora complimenti a Daniela e Aldo!

AGGIORNATA LA PAGINA FEI SU WIKIPEDIA

Ho fatto un piccolo aggiornamento della pagina dedicata alla F.E.I. su wikipedia https://it.wikipedia.org/wiki/Federazione_esperantista_italiana. Mancano ancora molti riferimenti (aiutatemi a metterli!), e, sono sicuro, mancano molte altre informazioni. In questa lista ci sono esponenti dispiaccio della F.E.I. e persone che ci "bazzicano" da decenni. Per favore aiutatemi a controllare che non ci siano scritte cavolate o dati obsoleti, passatemi più informazioni possibili per confermare i dati presenti; soprattutto mi interessano riferimenti ESTERNI ai fatti presentati, altrimenti siamo auto-referenziali e quindi, per wikipedia, da cancellare. Ciò aiuterà anche la pubblicazione della pagina in Inglese, attualmente in un "limbo" di indecisione per dubbio di non-enciclopedicità:

https://en.wikipedia.org/wiki/Draft:Italian_Esperanto_Federation

Marco Ciampa

(mandate le vostre osservazioni a notiziario@esperanto.it; le raccoglieremo e le gireremo, in forma organizzata, a Marco).

CORREZIONE

Nello scorso numero abbiamo pubblicato i nomi del neoletto estraro della UECI: purtroppo, abbiamo sbagliato a scrivere il nome di Giancarlo De Donno, e gli chiediamo scusa.

GIORNO DELL'ESPERANTO A PESCARA

esperanto

LA LINGUA INTERNAZIONALE EQUA
per il dialogo e la pace

L'Associazione Abruzzo Esperanto-Gruppo "Una voce per il mondo"
organizza un incontro su

**L'ECOLOGIA DELLA MENTE:
UN DISCORSO
DA DANTE A ZAMENHOF**

Conferenza del prof. **DAVIDE ASTORI**
Linguista dell'Università di Parma

intervistato da **MICHELA LIPARI**
Consigliere della FEI

sulle sue recenti pubblicazioni **DANTE IN ESPERANTO,**
IL MANIFESTO DELLA TERRA, HOMARANISMO

Saluto della Vice Presidente di Italia Nostra - Sezione di Pescara
CATERINA ARTESE

Introduzione della Presidente di "Una voce per il mondo"
MARIA GABRIELLA TAREI

Conclusione musicale: **DAVIDE PACE**
con la sua composizione "La vivo estas aventuro"

11 DICEMBRE 2021
ore 17.00
BIBLIOTECA FALCONE E BORSELLINO
Viale Bovio 446 - PESCARA

Sala gentilmente concessa da ITALIA NOSTRA SEZIONE DI PESCARA
INGRESSO LIBERO fino ad esaurimento posti
nel rispetto delle normative vigenti - GREEN PASS OBBLIGATORIO

DUE LINGUAGGI UNIVERSALI: MUSICA ED ESPERANTO

Ecco una bellissima storia di musica, suoni, ritmi, e gioia.

<https://orvietosi.it/2021/12/lincredibile-universo-di-clarissa-da-monterubiaglio-allafrica-la-musica-che-crea-legami/>

LIBRI STRENNAI!

Regalate libri in o sull'esperanto, per Natale! Sarebbe bene, nel caso, ordinare subito, altrimenti il regalo lo porta la Befana e non Babbo Natale. Sono sempre disponibili anche i calendari-segnalibri.

Per prenotazioni: a Livio presso segreteria FEI o feilibri@esperanto.it

VIA ZAMENHOF

La 7-an de decembro, je la 21-a, Michela Lipari prelegis interrete pri la libro de Roman Dobrzynski "Via Zamenhof", kiun ŝi mem tradukis. La prelego estis en la itala lingvo, ĉar ĝi estas ĉefe elpensita kiel diskonigo de informoj pri la historio, filozofio kaj kulturo de Esperanto al ĉiuj, kiuj alproksimiĝas al la lingvo. Ĝi tamen estis tre interesa ankaŭ por esperantistoj, kiuj emas ion ekscii pri la fascina vivo de L. C. Zaleski-Zamenhof, nepo de Zamenhof. <https://youtu.be/k351Tzo37Go>

EVENTOJ

Saluton, karaj, ĵus mi enmetis kelkajn eventojn de la lastaj jaroj en la liston de eventoj/progresoj por Esperanto, kiun mi iam kreis kaj prizorgas en la vikipedio.

https://eo.m.wikipedia.org/wiki/Historio_de_Esperanto#Ekde_1980

Unue laŭ mi la listo gravas por kontraŭstari tiujn Esperanto-parolantojn, kiuj rakontadas, ke ni neniel progresas, eĉ male, ni malkreskas laŭ ili. Nu, ĉio kostas tempon, laborhorojn, ne eblas ĉion fari samtempe. Sed ja estas videblaj progresoj. Do ni konsciu, kiu ni ja estas kaj kiu jam rekonis nin kaj nian lingvon. Due la listo servas por kontakto kun eksteruloj, ĵurnalistoj ktp. Trie mi kompreneble petas vin rigardi, ĉu mi nenion gravan forgesis. Kvare estas por mi iom rimarkinde, ke multaj landoj kaj iliaj reprezentantoj kaj Unesko kaj UN rekonas Esperanton, ofte simple per kunlaboro kun niaj organizaĵoj - kaj EU ne. Aŭ ĉu mi ion pretervidis? Se ne: Kial? Ĉu alia simila organizaĵo tiom okulfrape postrestas?

Louis Ferdinand (Lu) von Wunsch-Rolshofen

EDUKADO.NET

Proksime al la 20-jara datreveno de edukado.net, Katalin Kováts, redaktoro, anoncas, ke la retejo estas malnova, necesas ĝin rekonstrui, kaj petas la membrojn de edukado.net doni sian opinion pri la paĝaro, raporti pri tio, kiuj partoj pleje servis la uzantojn, por ke tiuj nepre povu esti rekonstruataj.

<https://www.youtube.com/watch?v=uGu3PCnm3Xs>

ESPERANTISTA SANKTULO

La papo agnoskis miraklon. Baldaŭ esperantisto el Frislando (Nederlando) fariĝos sanktulo. Temas pri Titus Brandsma (1881-1942), karmelana patro, profesoro pri filozofio, verkisto, ĵurnalisto kaj... ankaŭ do esperantisto.

Sube vi trovos ekranbildojn el la nederlanda novaĵelsendo NOS de la 25an de novembro (Zes-uur-journaal, ekde minuto 12 ĝis minuto 13:10):

https://www.npostart.nl/nos-journaal/25-11-2021/POW_04819632

KONGRESA TEMO

Karaj esperantistoj,

vi certe jam konas la temon de la ontjara itala kongreso:

"Paco ne okazas hazarde: la aktiva rolo de ĝemelurbaj rilatoj en la konstruo de eŭropa popolo".

Tiu temo estos pritraktata dum unu seminario kiu, laŭ kutimo de la italaj kongresoj, disvolviĝos en kvar matenaj sesioj sub la gvido de unu el la plej kleraj esperantistoj, prof. Javier Alcalde. Ne maltrafu la okazon partopreni aktive en tiu seminario!

Vizitu la paĝon <https://kongreso.esperanto.it/89/it/>, trovu la aliĝilon, plenigu kaj sendu ĝin.... kaj ne forgesu pagi la kotizon!

Kiu utiligas la eblecon pagi pere de uea-konto, bonvolu sendi la koncernan retmesaĝon ankaŭ al la itala kongreso.

Ni atendas vin, kaj ni estas pretigantaj novajn surprizojn

EH, TIO NE OKAZOS, SE ONI UZUS ESPERANTON

È una crema per rimuovere le pellicine che si formano sotto i piedi. Sembra più una ricetta adatta a una stregoneria...

€ 1,85 - 5,31 ~~€ 2,90 - 8,3~~ -36%



Latte Per I Morti Della Pellicola Della Pelle Per
Rimuovere Cheratina, vecchio Scarafaggi Rivelare
Del Piede Del Bambino E La Cura Del Piede Tenera
Scivoloso Pellicola Del Piede

